

Giorgio Silfer, la nova arkivisto de la Dokumentejo Edmond Privat raportas pri sia laboro

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-842/327, 1979 novembro 29 kaj decembro 01

[http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-49-
/Radioprelego_842_SRI_327_1979_11_29_12_01_Giorgio_Silfer_la_nova_arkivisto_de_la_Dokumentejo_Edmond_Privat_raportas_pri_sia_laboro.mp3](http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-49-/Radioprelego_842_SRI_327_1979_11_29_12_01_Giorgio_Silfer_la_nova_arkivisto_de_la_Dokumentejo_Edmond_Privat_raportas_pri_sia_laboro.mp3)

Cl.- Ĉi tie Svisa Radio Internacia. S-ro Giorgio Silfer estis elektita fare de la Urba Biblioteko La Chaux-de-Fonds kiel arkivisto de la dokumentejo Edmond Privat. Claude Gacond intervjuas lin tiurilate.

Sinjoro Giorgio Silfer, antaŭ unu jaro vi alvenis en Svislandon por helpi al la starigo de Internacia FERIA Altlernejo (IFA). Nun vi ĵus komencis, ni diru, pli precizan funkcion, vi eniris la Fonds Edmond Privat (estas fako de la biblioteko) por prizorgi la materialon ĝis nun ne ankoraŭ prizorgitan. Kaj ĝi estas amasego, ĉu ne? Ĉu vi povas unue klarigi ekzakte, kio estas tiu Fonds Edmond Privat?

GS.- En la franca lingvo 'fonds' havas du signifojn: ĝi estas kaj fonduso, do trezorejo, kaj specifa fako, kie oni kolektas dokumentojn, librojn, valorajn korespondaĵojn, gazetojn kaj tiel plu. Do en tiu ĉi fonduso, se vi volas, Edmond Privat, por uzi francismon en esperanto, mi vidas du funkciojn. Unu, ni diru pasiva, ĝi estas la funkcio de la muzeo. Fakte tie ni gardas ankaŭ la skribotablon, ni gardas la seĝon, ni klopodas rekrei la etoson de la ĉambro kie laboris Edmond Privat. Eĉ fizike rekrei tiun meblaron.

Cl.- Kaj ĝuste tie vi laboras, ĉu ne?

GS.- Jes, fakte, nuntempe mi utiligas tiun angulon de la fondusejo. Sed aliflanke ekzistas unu aktiva aspekto kaj tiu estas: rememorigi Edmond Privat, honori la laboron, kiun li faris, la idealojn, por kiuj li vivis, la streĉojn, kiujn li plenumis pere de serĉado, de esploro kaj ne nur do de reordigo de la granda materialo kiun li lasis herede al la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Ĉu vi sentas vin ligita al tiuj idealoj de Edmond Privat?

GS.- Mi devas diri, ke la idealoj de Edmond Privat estas tre kongruaj ĝenerale kun la esperanta kulturo. Estas fundamento de nia internacia esperanta kulturo la toleremo, la strebo al interkompreniĝo kaj al paco. Tiu pacismo de Edmond Privat estis tre proksima al la homaranismo de Zamenhof, do ĝi estas unu el la trezoroj de nia komuna esperanta kulturo, pri tio ne estas demando ĉu oni povas esti proksimaj aŭ malproksimaj, simple, ĉar tiuj idealoj estas en ĉiuj esperantistoj. Ili konsistigas parton de la kultura fono kaj estas tre interese, ĉar Privat iel komplementis al Zamenhof. La pacismo de Zamenhof, la idealismo de Zamenhof havis nete orientan devenon, dum Edmond Privat estis la homo, kiu evoluis al sia idealismo pere de okcidenta trasuferado kaj pere de sinpreparo, kiu baziĝis sur okcidentaj filozofoj, intelektuloj, unavice la plej granda ĝenevano, nome, Rousseau.

Cl.- Edmond Privat do havis multajn batalkampojn, ĉu ne, li laboris por la sendependiĝo de landoj, li laboris por religiaj celoj interalie la kvakerismo, eble tre persona kvakerismo, ĉu ne? Li laboris ankaŭ politike por sindikataj kaj socialistaj kooperativaj gazetoj. Ĉu vi pensas,

ke ĉirkaŭ tiu Fonds Edmond Privat, kiam ĝi estos pli ordigita, povus okazi specoj de kolokvoj pri tiuj diversaj agadoj por eble vidi post dudek jaroj, ĉu estis progreso aŭ ne ?

GS.- Jes, mi dirus, ke pli ol la svisa agado de Edmond Privat estas interesa la agado kiun li havis kun la aliaj kontinentoj. Unuavice kun Azio kaj kun Norda Ameriko kaj ankaŭ kun, ni diru, granda subkontinento, tio estas kun Orienta Eŭropo. Edmond Privat estas unu el la homoj kiuj dum ĉi tiu jarcento enportis novajn ideojn al la malnova kontinento, al la malnova Eŭropo kaj al la eta Svislando. Ekzemple lia rolo rilate al Gandhi-ismo kaj la agado de Gandhi en Hindio estas nepre esplorinda. Kaj ankaŭ lia proksimeco al la kvakerismo estas sendube unu el la rezultoj de lia profunda kontakto, intima kontakto kun la usona kunteksto, mi diru, kun Usono, mi diru.

Cl.- Kaj ankaŭ kun Hilelismo.

GS.- Jes, kvankam ĝuste mi havis la impreson el tio, kion mi ĝis nun esploris, ke la hebrea demando ne estis tiom grava por Edmond Privat. Por Edmond Privat estis gravaj, kompreneble, ĉiuj demandoj pri subpremataj etnoj kaj do evidente estis grava ankaŭ la demando hebrea, sed li estis unu el la unuaj eŭropanoj, kiuj klarvide analizis la problemojn de koloniismo kaj analizis ilin el ekzemple tre persona vidpunkto, li ne estis nepre ligita al iaj specifaj grandaj ideologiaj skoloj, ĉu dekstraj ĉu maldekstraj, sed li kapablis konservi intelektan ekvilibron en ĉio, kaj do ankaŭ pro tio li estas eksterordinare interesa. Pri tiuj temoj ni devus aparte insisti, se oni volos lanĉi kolokvojn ekzemple, aŭ diversajn iniciatojn kadre de la lasta jardeko antaŭ la centa datreveno de la naskiĝo de Privat. Cetere, ĉi-jare ni rememorigis en La Chaux-de-Fonds, la 17an de aŭgusto, ni rememorigis la naŭdekan datrevenon de la naskiĝo de Edmond Privat.

Cl.- Ni esperas foje povi aperigi, eldoni biografion de Edmond Privat. Ĉu vi mem ŝatus kunlabori aŭ eĉ verki ĝin, ĉu vi sentus kapablon tiudirekte?

GS.- La ŝato ekzistas, pri la kapablo mi ne povas juĝi ĉar estas tre malfacile fariĝi biografo de Edmond Privat. Lia vivo estis tre intensa, li eksterordinare vojaĝis kaj la dokumentaro kiun heredis la biblioteko finfine estas tre fragmenta. Li ne estis la plej taŭga sekretario de si mem.

Cl.- Jes, ĉar ekzemple li neniam konservis duoblaĵon de la propraj leteroj, ĉu ne ?

GS.- Oni devas rekonstrui tutan korespondadon kaj rekonstrui la opiniojn de Edmond Privat surbaze de la respondoj, kiujn li ricevis. Li havis ankaŭ tre multajn kontaktojn kaj ankaŭ pro tio ne estas facile diri, kie la kontakto estis vere intima, aŭ la intereso estis iom pli supraĵa. Do estas tre malfacile verki biografion de Edmond Privat, sed almenaŭ oni povus verki specifajn biografiojn pri specifaj momentoj,

Cl.- la verkisto, la...

GS.- jes, aŭ ekzemple, mi kredas, ke plej interesa en la nuna momento estas rememorigi Edmond Privat, aŭ diskonigi ĉar finfine li estas tute ne konata ĉe la junaj generacioj. Kaj la ekzemplo de Edmond Privat, kiel junulo, kamarado de Hector Hodler estas eksterordinare grava. Do, li estis 18jara knabo finfine, kiu rondiris tra Usono por propagandi esperanton kaj lia sindediĉo ne estis tiom blinde entuziasma, li kapablis jam tiam havi certan ekvilibron kaj

Edmond Privat estas veŝajne unu el la plej klaraj kaj kleraj atestoj pri la devizo ke la homo estas simple la daŭrigo de la knabo.

Cl.- Vi aŭdis intervjuon kun Giorgio Silfer pri Edmond Privat. Claude Gacond diras nome de Svisa Radio Internacia : ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*